

Reformo de la esperanto-instruado, 2-a parto
Claude Gacond, 177-a radioprelego, 1967.03.01 & 1967.03.04

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni vidis kelkajn kaŭzojn al reformo de la esperanto-instruado. Ni revenu hodiaŭ al tiu aktuala temo.

A.- Malfermante kurson lingvo-profesoro elektas lernolibron, kies didaktika celo estas plej precize konforma al la celo de lia kurso. Bedaŭrinde por ni, estas malfacile diveni la intencojn de la verkintoj de la esperanto-lernolibroj.

Cl.- La nebuleco de iliaj intencoj estas pruvo, ke la aŭtoroj celis kontentigi kiel eble plej vastan publikon. Rezulto : plej ofte ili kontentigas neniun.

A.- Nian diron vi eble trovos iom troa. Tamen observu la komencantojn, kiuj deziras vere lerni esperanton. Malofte ili kontentiĝas pri la unue aĉetita lernolibro. Ricevante la impreson, ke la lernolibro ne instruas ĉion, ili serĉas pli bonan instruilon, kiu estu adaptita al iliaj deziroj.

Cl.- Kaj tiuj deziroj hodiaŭ ĝenerale estas : **povi lerte paroli la lingvon.**

A.- Vizitante kunvenon ili aŭdas strangajn dirojn, kies tradukon ili vane serĉos en la lernolibro :

Cl.- *Ĉesu krokodili !*

A.- *Se mi sciintus, mi prenintus mian fotilon.*

Cl.- *Jen la aliĝilon ! Bonvolu ĝin plenigi !*

A.- Iom post iom ili komprenos. Tiam sin prezentos nova malfacilaĵo.

Cl.- Ĉu diri **komenci** aŭ **komenciĝi**, **fini** aŭ **finiĝi** ? Ĉu diri **de** aŭ **da** ? Ili informiĝas kaj konstatas, ke la aliaj esperantistoj ne havas tre firman konon pri tiuj gramatikaj punktoj.

A.- Baldaŭ ili malkovros, ke tre malmultaj esperantistoj en la loka klubo metas la akuzativon en la bonan lokon, ke la uzo de la participoj estas pli frukto de la hazardo, ol de la volo.

Cl.- Ili pensos : « Ĉu esperanto estas sufiĉe simpla ? »

A.- Tiun demandon faris pasintjare la bazela grupo okaze de tri-landa renkontiĝo. Ni havis la okazon partopreni tiun kunvenon kiel svisaj debatantoj. Estis por ni la okazo fari kelkajn demandojn.

Cl.- Inter tiuj demandoj troviĝis : **Kiel formiĝas la adjektivoj en esperanto ?**

A.- *Per a.*

Cl.- Kion signifas **universo** ?

A.- **Univers** traduke respondis la franclingvanoj.

Cl.- En la franca indiku la adjektivon de **univers** !

A.- **universel**

Cl.- Traduku tiun adjektivon en esperanton !

A.- **universa**

Cl.- Kial do **Universala Esperanto-Asocio**? kaj ne **Universa Esperanto-Asocio**?

A.- Ĉeestis cento da esperantistoj. Alvenis nenia respondo.

Cl.- Ili ne komprenis, ke **universa** signifas fakte en la franca **de l'univers** : la universa granda : la grandeur de l'univers, dum **universala** tradukas la francan adjektivon **universel** : universala leĝo, une loi universelle. Ĉar en esperanto la adjektivo fakte estas noma komplemento, kiam la adjektivo ne povas havi la saman signifon kiel la noma komplemento, ĝi prenas la sufikson **al** antaŭ la finaĵo **a**. Kiu lernolibro tion instruas ? Neniu. Tamen la listo de tiuj radikoj posedantaj du adjektivojn estas impone longa kaj la sufikso **al** estas tre ofta. Ni donu ekzemplojn :

A.- natura – naturala
 norma – normala
 bruta – brutala
 centra – centrala
 denta – dentala
 forma – formala
 imperio – imperiala
 horizonta – horizontala
 individa – individuala
 neŭtra – neŭtrala

Cl.- Ni ne volas longigi tiun liston. Sciu nur, ke pli ol cent radikoj obeas tiun regulon. Tamen la lernolibroj silentas pri ĝi, ĉar Zamenhof antaŭ 80 jaroj silentis pri ĝi. Kiel religiuloj la verkintoj de la lernolibroj pli ripetas, kion ili trovis en la verkoj de Zamenhof, ol ili provas kompreni la signifon de tiuj verkoj. Pro tio nun ekzistas abismo inter la parolata kaj skribita lingvo kaj tiu de la lernolibroj. Tiu fosaĵo alkondukos nin al kriza situacio, se tiuj ni ne regajnas la perditan tempon kaj ne kapablas verki por la nova generacio librojn, kiuj ebligas havi klaran komprenon pri la spirito de nia lingvo, kiel ĝi estas, kaj ne kiel kursgvidantoj ŝatas ke ĝi estu.

A.- En Bazelo ni uzis kolor-slipejn por reprezenti la radikojn. Radikoj verbaj estis ruĝaj, radikoj nomaj estis bluaj, radikoj adjektivaj estis verdaj kaj radikoj kroĉilaj estis blankaj. Kion facile konstatis la kongresanoj ?

Cl.- Ke fakte en nia lingvo ekzistas diversaj specoj de radikoj, kaj ke ĉiu speco obeas al apartaj reguloj por la vortfarado. Metante tiujn slipejn sur flaneltabulon la ĉeestantoj por la unua fojo povis konstati, ke la radikoj estas kiel individuoj, kiuj reagis laŭ kvar fundamentaj kaj malsamaj manieroj, laŭ sia kategorio.

A.- Tion ne instruas la lernolibroj, verŝajne ĉar Zamenhof ne indikis ĝin en sia unua lernolibro.

Cl.- Tamen en 1910 René de Saussure detalege priskribis la esperantan vortfaradon, kaj Zamenhof tiam salutis publike tiun kontribuon al la klarigo de la esperanta vortfarado.

A.- Hodiaŭ esperanto tiel rapide disvastiĝas, ke manko de veraj lernolibroj, kiuj instruas, kiel estas la vera lingvouzo, riskas permesi la alfluon de idiotismoj en lingvon, kiu ilin malfacile digestas.

Cl.- Pri tiu temo ni parolos la venontan semajnon. Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-